



Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Novembro : 2 2022

MON-PUNO PRO HAVIGO DE PAKAĴO AL NAJBARULO

La hispana agentejo kiu celas protekti personajn datenojn ĵus mon-punis transport-kompanion je 70.000 eŭroj, pro la fakto, ke oni havigis pakaĵon al najbarulo de la ricevonto sen la permeso de ĉi tiu lasta.

Laŭ la agentejo, ĉi tiu agado provokas, ke la datenoj aperantaj sur la etikedo de la pakaĵo estos konataj de la najbarulo kun nenies permeso. Verdire, la liverado de pakaĵoj al najbaruloj aŭ al proksimaj vendejoj estas ofta kutimo kiam la ricevonto ne troviĝas hejme. La transport-kompanio UPS, tiu mon-punita, eĉ avertas pri tio en la listo de kondiĉoj akceptendaj de la uzanto de ties transportaj servoj. Tiel, ene de tiu listo oni avertas, ke, se la ricevonto ne troviĝas hejme la pakaĵo povos esti lasita en poŝt-kesto aŭ liverita al najbarulo, escepte kiam ĉi tio ne estas permesata de la uzanto de la servo.

En ĉi tiu kazo vendejo de elektronika ilaro uzis la servojn de transport-agentejo por liveri produkton al aĉetinto. Do, vere ĉi lasta neniam



kontraktis rekte la servojn kun la transport-agentejo, pro tio li neniam rajtigis liveri la pakaĵon al najbarulo, pro la fakto, ke estis la vendejo kiu reale kontraktis kun la transport-kompanio. Tamen, la hispana administracio konsideris, ke la ricevonto akceptas tiujn kondiĉojn, se li ne subskribis akordojn kun li. Do, la havigo de personaj datenoj al aliaj homoj fare de la transport-kompanio estas punenda ago.

Ĉi tiu mon-puno povos esti apelaciita antaŭ tribunalo kaj sendube tion faros la transport-kompanio. Tamen, ĝis definitiva decido de tribunalo, tiu ofta kutimo lasi pakaĵon ĉe la apuda pordo povos esti mone punita.

Vorto de la Semajno

Banko-konto:

Komerca skriba kalkulo pri ŝuldoj aŭ havaĵoj kiu iu havas ĉe institucio, kiu plenumas tre diversajn financajn operaciojn.

Banko-kontulo: Persono havanta tiun konton.

Banko-konteltiro: Parta kopio, kiun oni sendas al kliento, por ke li vidu la staton de sia konto.

Sinonimo: *Kuranta konto.*

Eblas ĝiri monon al via banko-konto kiel antaŭpagon.



INVITO AL VIRTUALA KUNVENO DE E-KLUBO EN MIZURIO

La loka Esperanto-klubo en Sankta-Luiso, Mizurio, Usono invitas ĝiujn esperantistoj al la venonta virtuala kunveno de tiu klubo, okazonta la 19-an de novembro, tiam gasto estos **Chris Zervic**, kiu rakontos pri sia vivo kiel advokato. Post tio, oni babilos pri kio ajn.

Horo: 14:00 ĝis 15:00 hor-zono de Ĉikago en Usono.
GMT – 7.

Ret-paĝo: esperanto-stl.weebly.com/events.html

Tie videblas la Zoom-ligilo

